

LA AFEROJ NE ESTAS TIAJ, KIAJ ILI ŜAJNAS ESTI

Du anĝelaj pilgrimantoj haltis, por pasigi nokton en domo de riĉa familio. La familio estis negastema kaj rifuzis lasi la anĝelojn en la ĉambro por gastoj. Anstataŭ tio ili estis loĝigitaj en malvarma kelĉambro. Post kiam ili aranĝis kuŝlokon sur la malmola planko, la pli aĝa anĝelo ekvidis en la muro truon kaj ŝtopis ĝin. Kiam la pli juna anĝelo mirante demandis kial, la pli aĝa respondis:

„La aferoj ne estas tiaj, kiaj ili ŝajnas esti.“

Venontan nokton ili eniris por ripozi en tre malriĉan domon de tre gastema farmisto kaj lia edzino. Post tio, kiam la geedzoj kun ili dividis iom da manĝo, ili diris al la anĝeloj, ke ili tranoktu en iliaj litoj, kie ili bone ripozos.

Matene post tagiĝo trovis la anĝeloj farmiston kaj lian edzinon kun okuloj larmoplenaj. Ilia ununura bovino, kies lakto estis ununura enspezo de ilia familio, kuŝis morta en la brutstalo. La pli juna anĝelo demandis la pli aĝan, kiel povis tio okazis. La unua viro havis ĉion kaj vi helpis al li, li riproĉis. La dua familio havis malmulton, sed ĝi volonte dividis kun ni ĉion, kaj vi permesis, ke ilia bovino mortu. Kial?

„La aferoj ne estas tiaj, kiaj ili ŝajnas esti,“ respondis la pli aĝa anĝelo. „Kiam ni estis en kelĉambro mi rimarkis, ke en la murtruo estis provizo da oro. Ĉar la posedanto estis obsedita per monavido kaj per malkomplezo dividi feliĉon, mi ŝtopis la muron, por ke li ne trovu la trezoron. Kiam ni venontan nokton tranoktis en litoj de farmisto, alvenis la anĝelo de morto por lia edzino. Anstataŭ ŝi mi donis al li bovinon.“

La aferoj ne estas tiaj, kiaj ili ŝajnas esti. Plej ofte ni ne konas ĉiujn interligojn. Eĉ se vi havas kredon, vi ankaŭ bezonas fidon, ke ĉio, kio okazas, ĉiam celas vian utilon. Kaj tion oni ekkomprenas nur post tempopaso. Iuj homoj alvenas en nian vivon kaj rapide foriras, iuj iĝas niaj amikoj kaj dummomente restos. Tamen ili restigas en niaj koroj belegajn spurojn – kaj ni neniam restos tute egalaj, ĉar bonaj homoj nin aliformigas!

Hieraŭo estas historio. Morgaŭo sekreto. Hodiaŭo, la estanteco estas donaco. La vivo estas neordinara kaj gusto de ĉiu momento neripetebla!

Tiom da doloro kaj sufero en la mondo.“ ■

(El interreto)